

kulaborantojn, kiuj daŭrigos tiun ĉi laboron. Bonvolu proponi al ni vian helpon!

Ni supozas, kiam ni pripensas niajn fortojn, ni proponas, ke venontan du-numeron 5-6 de Informilo ni preparos ĝis komence de junio 2021. Tiam espereble ni scios pli, ĉu ni trovos niajn kunlaborantojn.

Ni petas pardonon al korektantoj de nia gazeto, ke ni pro manko da tempo ne sendis tiun ĉi numeron por ilia korekto. Ni esperas, ke ili restos tiel afablaj kaj daŭrigos korektadon de pluaj numeroj, ke ili helpos forigi erarojn, kiel ĝis nun tion faris.

Ankaŭ bonvolu noti alian telefonnumeron, kiu estas en la kadreto sur la lasta paĝo. La telefonnumero, kiu estas ankoraŭ skribita en la marta numero de Informilo ne plu validas.

En la unua numero de la Informilo vi estis invititaj partopreni seminarion en la hotelo „Kavka“ en Malá Skála en aprilo 2021 kaj Lenka ankaŭ planis organizi la karavanvojaĝon al la 106-a UK en Belfasto. Bedaŭrinde ankaŭ tiujn aranĝojn ni devis nuligi.

Fine bonvolu permesi al ni, ke ni nur tiamaniere dankas al ĉiuj, kiuj esprimis per siaj kompataj vortoj kondolencon okaze de forpasoj de iama prezidantino de AEH Jarmila Rýznarová, kaj ankaŭ de Lenka Angelová. Ni kredas, ke al ambaŭ vi rememoros sincere kaj ofte, same kiel ni.

Mirka kaj Ludmila

Tristaj informoj:

La 18-an de marto 2021 forpasis pro kovim en la aĝo de nuraj 62 jaroj Lenka Angelová, prezidantino de AEH (Asocio de Esperantistoj – Handikapuloj) kaj aktiva membrino de la E-Klubo en Pardubice. Kiel filino de Jarmila Rýznarová ŝi estis dumviva esperantistino bone konata al multaj ĈEA – membroj kaj ankaŭ eksterlande. Profesie ŝi laboris kiel oficistino en la Regiona Biblioteko en Pardubice.



Ŝia amikemo, bonhumoro kaj vivĝuemo elradias el ŝiaj fotoj en https://www.facebook.com/*lenka.angelka/photos, plejparte el la aranĝoj de la klubo E – mental´, kies fervora partoprenantino ŝi estis.

En ŝia kabano en Jevany apud Prago ankaŭ okazis kelkaj el ili. En la jaro 2015 ŝi ĉeforganizis inter alie busekskurson al la 100-a Universala Kongreso en Lille.

Ni rememoru ŝin ankore kaj inspiriĝu per ŝiaj ĝojkapablo kaj varmkoreco, ĉar por sencohava transvivo en la nuna periodo ili pli gravas pli ol aliam.

Pavla Dvořáková.

Kun kordoloro ni anonas, ke por ĉiam forlasis nin amata edzino, patrino, fratino, bofratino, onklino, avino kaj afabla amikino, sinjorino

Lenka ANGELOVÁ

Ŝi foriris neatendite sen la sorteto de la adiaŭo
la 18-an de marto 2021
en la aĝo 62 jaroj. . .

Nome de la familio:
edzo Kiril
filino Klárka
filo Petr kun edzino Lučka
genepoj Sebník, Natálka kaj Belinka
fratino Mirka kun filo Jirka
Jitka kun familio
Jirka kun familio

*Mi adiaŭas kun Vi amikoj karaj,
la manpremon hodiaŭ al Vi jam mi ne povas doni,
la koro mia finbatis, la fortaj forlasis min,
mi adiaŭas kun ĉiuj kiuj amis min.*

Kun dankemo por ĉio, kion ni povis kun ŝi travivi, ni kun nia afabla anĝelo lastfoje adiaŭas la 29-an de marto 2021 je 13.45 horo en funebra aŭlo de krematorio de Pardubice.

Ni dankas al ĉiuj por silenta komemoracio.
adreso: U. Suchbátůva 622, Pardubice 530 02



La 7-an de marto 2021 forpasis Václav Stibůrek el Benešov, ano de AEH, delegito de Ĉeĥio por SAT en la aĝo 79 jaroj kaj tuj la 8-an de marto 2021 mortis ankaŭ lia edzino Marie Stibůrková.



Plua trista sciigo – la 20-an de marto 2021 mortis anino de AEH, membrino de E-klubo en Benešov kaj ankaŭ de la Katolika sekcio de ĈEA Marie Žižalová en la aĝo 76 jaroj

Honoron al ilia memoro!

Rememoro je tri anoj de Esperanto-klubo Benešov

Ĉi jara marto estos por ni, klubanoj, trista kaj neforgesebla tempo. En nur kelkaj tagoj ni perdis tri anojn, tri homojn por ni karaj kaj gravaj.

La 7-an de marto forpasis Vaĉjo Stibůrek, delegito de Ĉehio por SAT kaj longjara gvidanto de la klubo. Fakte li estis vekiĝinto de Esperanto en Benešov. En la urbo mem havis nia lingvo tradicion preskaŭ de komenco de la pasinta jarcento.

Kiel okazadas eble en ĉiuj lokoj – E klubo ekestis, Esperanto vivis, post kelkaj jaroj klubo disfalis. Esperanto en la urbo mizeris, sed vivetis.

En la jaro 1983 Vaĉjo Stibůrek revivigis Esperanton en Benešov, refondinte la E klubon. Mi mem fariĝis membrino de la klubo ĉirkaŭ la jaro 1995. Nur de tiu tempo mi konis geedzojn Stibůrek, sinjorinon Majka

Žížalová kaj aliajn klubanojn. Ili venadis kaj foriradis. Sed tiuj tri fidele restadis.

Vaĉjo estis geodeziisto kaj entuziasma turisto. Li ŝatis rakonti al ni pri liaj vojaĝoj tra la naturo de nia kaj fremdaj landoj, kiujn li vizitis. Li kreis eĉ mapon de „Pado de Drahoš“ en Skokovy (Kia domaĝo, ankaŭ la penziono Espero en Skokovy de tiu ĉi printempo ne plu ekzistas!)

Lia edzino Marienka, estinte ankoraŭ tiam sana, ĉiam kaj ĉien veturadis kun li. Oni diru – ne disigebla duopo. En lastaj jaroj ŝi grave malsaniĝis kaj Vaĉjo sindone hejme (!) flegis pri ŝi. Li, nun jam sole, vizitadis la klubon kaj ni, klubanoj, admiris lian prizorgon. Vere estas admirinde.

Komence de marto, la 7-an, pro koronaviruso estingiĝis lia kandelo. La pluan tagon, la 8-an, sekvis lin lia amata edzino Marienka.

Post kelkaj tagoj de tiu ĉi trista foriro oni eksciis, ke ankaŭ Majka Žížalová, nia karulino, kronikistino de la klubo, pro koronaviruso forpasis. Terure! Majka estis bona animo de la klubo. Iama instruistino, anino de IKUE, kredanta, kaj de AEH, ĉiam, spite ŝiajn sanproblemojn, ridetanta, optimisma, amika, bonhumora.

Kion aldoni? Mi ne plu havas vortojn.

L. Chaloupková, E-klubo Benešov

Finkalkulo de AEH de la jaro 2020 + budĝeto por la jaro 2021

	budĝeto 2020	realo 2020	budĝeto 2021
Enspezoj			
dotoj, donacoj	10 000	12 500	10 000
membrokotizoj	25 000	21 904	20 000
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
Sume	35 000	34 404	30 000
Elspezoj			
materialo	10 000	2 764	6 000
poŝto, telefono, interneto	21 000	23 815	15 000
riparoj, servoj	1 000	6 000	5 000
gazetoj, libroj	500	0	500
kunvenoj	500	0	500
vojaĝelspezoj	1 000	0	1 000
banko	0	0	0
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
dotoj, donacoj	500	700	1 000
Sume	34 500	33 279	29 000
Enspezoj - elspezoj			
	500	1 125	1 000

Lenka Angelová p.p.m.
prezidantino de AEH

Ing. Stanislava Nováková p.p.m.
kontistino de AEH



Rememoro

En Prago-Vyšehrad ĉe la ŝtono de Esperanto antaŭ la iama kongresejo de la UK en la jaro 1996, komune rememoradis al Lenka la anoj de la klubo E-mental', por ke ili almenaŭ virtuale adiaŭu kun ŝi. En nunaj malfacilaj tempoj ili ne povis alveturi al Pardubice por partopreni kremacion.

Ili komune kantis E-kanton por Lenka. Ŝi lastfoje kantis kun ili dum BIERo en Třeboň en la j. 2018. L.S.

INFORMILO – monata gazeto

por esperantistoj-handikapuloj + suplemento ANTAŬEN

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,

530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: ah@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky 2010

IBAN: CZ352010000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo 20 € (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)

Roční předplatné Informila 300,-Kč (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.